

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



*Sonorilo*

56a jaro n° 5

Septembro - Oktobro 1964

# Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

**REDAKCIO:** JAUMOTTE MAURICE  
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81  
MAERTENS GRÉGOIRE  
POUPEYE CHARLES

## KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ:

DR. POL DENOËL  
DURWAEL IVO  
ISERENTANT ROGER  
DE CUYPER GEORGES

**ADMINISTRADO:** TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



**ASOCIO SEN PROFITA CELO**

**SIDEJO & PREZIDANTEJO**

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

**HONORA PREZIDANTO**

KEMPENEERS PAUL

**HONORA VICPREZIDANTO**

SIELENS HENRI

**ĜENERALA PREZIDANTO**

JAUMOTTE MAURICE

**PREZIDANTOJ**

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK  
DRO DENOËL POL, 10 RUE V. RASKIN LIÈGE

**UNUA VICPREZIDANTO**

ROOSE FERNAND

**VICPREZIDANTINO FAKESTRINO POR KONGRESOJ**

PLYSON J. 23, PLACÉ E. FLAGEY, BRUSELO 5 P.K. 236804

**VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ**

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOROKEN

**SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO**

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

**SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO**

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLÉDOT, MONCEAU SUR SAMBRE

**KASISTINO**

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

**POŝTKONTO DE B.E.F.:** 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

**ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2  
P.K. 905125

## 49A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Dum la unua semajno de aŭgusto en Hago

Dum la ferma kunsido de la 49a Universala Kongreso en Hago, la estraro de U.E.A. proponis la jenan rezolucion, akceptitan jam unuanime de la Komitato, kaj kiu enhavas proponon, kiun U.E.A. antaŭmetos, en la nomo de miloj kaj miloj da subskribintoj, al Unuiĝintaj Nacioj, okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

La Kongresanoj unuanime kaj per aplaŭdo longdaŭra akceptis ĝin.

Jen la teksto:

"Donante plenan apogon al la ĉiopodoj de Unuiĝintaj Nacioj progresigi la kunlaboradon inter la popoloj kun la celo displi internaciajn tensiojn kaj firmigi la mondan pacon; sed profunde konvinkitaj, ke la lingvodiverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kooperado sur ĉiuj niveloj; prenante en konsidero la rezolucion de la 10-a de decembro 1954 per kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo";

La 49a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Hago de la 1-8a de aŭgusto 1963, kiun partoprenis pli ol 2500 reprezentantoj el 43 landoj de ĉiuj kontinentoj, proponas, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Statoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj."

Kiam la Haganoj invitis la 49an Universalan Kongreson al Hago, ili povis kalkuli pri la plena dispono de la grandioza konstruaĵo de la Kurhaus de Scheveningen, kie ĉio, kio rilatas al la Kongreso, estus povinta okazi.

Pro intertempa forvendo de tiu ĉi entrepreno kaj ne plena informigo de la aĉetinto, tiu espero estis parte neplenumigebla. Kaj nur la inaŭgura kaj ferma ceremonioj kaj la du ĝeneralaj kunsidoj de U.E.A. povis tie okazi.

La L.K.K., kiu povas kaj devas esti laŭdata pro la granda laboro efektivigita en do pli malfacilaj cirkonstancoj, tamen trovis solvon, kiu povis kontentigi ĉiujn. Ĝi sukcesis lui, — ankaŭ en Scheveningen, — la grandan konferencejon "Op Gouden Wieken", kies "babilejo" estis ja tro malgranda kaj en kiu la temperaturo iĝis ofte ne plu eltenebla; sed kie ĉiuj kunsidoj povis tamen agrable disvolviĝi.

Bedaŭrinde en tiu konstruaĵo ne restis eĉ la plej eta loko por budoj, nek por ĝiĉetoj, kaj tiujn oni do lokigis en gimnastiksalono ankaŭ ne tro granda, de iom malnova lernejo, je cento da metroj de la kongresejo.

Ni nenion tiurilate tamen kritiku, sed pripensu ke organizi kongreson en Hago-Scheveningen, dum la monato de aŭgusto, estas entrepreno, kiun malmultaj L.K.K.-oj kuraĝus akcepti.

Ni tuj diru ke, laŭnombre, la Kongreso estas jam granda sukceso: pli ol 2.500 partoprenantoj el 43 landoj kaj el ĉiuj kontinentoj.

La interkona vespero, kiel cetera ankaŭ la teatro-prezentado, la feste-

no kaj la balo okazis en Hago mem, sed en la iom aparte lokigita "Dierentuin", restoracio-festejo, postrestinta post la malkonstruo de la iama Zoologio.

Sabaton vespere, tiu Interkona Vespere jam kunigis la gravan plimulton de la kongresantoj kaj regis tie plej agrabla kaj amika... sed varmega atmosfero.

Dimanĉon okazis, posttagmeze, la "Inaŭguro" de la 49a U.K. kaj la vasta salono de la "Kurhaus" estis apenaŭ sufiĉe granda por enteni ĉiujn kongresanojn.

Prezidis la kongreson: S-ro Holmes, vicprezidanto, aganta prezidanto post la morto de Prof. Dro Yaghi. Ĉeestis tiun solenaĵon, kvar reprezentantoj de la oficialaj nederlandaj rondoj, inter kiuj la reprezentanto de la Ministerio por Instruado, Arto kaj Sciencoj kaj la provinestro de Sud-Holando, kiuj ambaŭ parolis nederlandlingve kaj kies paroladon F-ino Vermaas resume tradukis.

S-ro Wensing, vicprezidanto, dankis la nederlandajn aŭtoritatojn kaj tiam sekvis la salutojn de la registaraj reprezentantoj. Nome de la belga Ministro pri Nacia Edukado kaj Kulturo salutis nia Ĝenerala Prezidanto S-ro Maurice Jaumotte; dum salutis, nome de la Belga Federacio, s-ro Grégoire Maertens.

Post muzikaĵo, sekvis Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario. Tiun paroladon ni vere ne povas, tie ĉi, resumi, sed multaj el niaj legantoj certe legos ĝin en la revuo de U.E.A. kaj komprenos la grandan aplaŭd-sukceson, kiun la lerta paroladisto akiris je la fino.

Kaj post tiu Inaŭgura Solenaĵo povis komenciĝi la diversaj laboroj de la kongreso, kiuj konsistis el estraraj kunsidoj; komitatataj kunsidoj de U.E.A., kiuj daŭris tri plenajn tagojn; paroladoj de la Internacia Somera Universitato, kunveno de la Akademio, plenaj kunsidoj de la UEA-membroj, projekcio de la unua longdaŭra, tute esperantlingva filmo "Angoroj"; kaj centoj da fakaj kunsidoj, en kiuj kunvenis kongresanoj apartenantaj al sama profesio aŭ kiuj havas saman aŭ similan "hobion", idealon aŭ kredon (\*).

Se la festeno ne ŝajnis al ni same grandskale ĉeestata, kiel dum antaŭaj kongresoj, la balo kiu sekvis ĉiuokaze estis same vigla. Kaj la entuziastaj dancemuloj ĉiuj restis ĝis la lasta momento kaj amuziĝis plej bone.

(\*) Krom la katolika kaj protestanta Di-servoj, kiuj kiel kutime okazis la dimanĉon, antaŭtagmeze, ni citu laŭorde, kunsidojn de Baha'anoj, framasonoj, libersocia rondo, instruistoj, fervojistoj, sciencistoj, skoltoj, juristoj, filmistoj, kristanoj, Martinus-instituto, katolikoj, geografoj, eldonistoj, rotarianoj, veteranoj, ĵurnalistoj, studentoj, bestamikoj, kuracistoj, ŝakligo, spiritistoj, militrezistantoj, Esperanto-civito, kontraŭalkoholistoj, ktp. Kaj ni menciuj ankaŭ ke la jaŭdo estis rezervita al grandaj ekskursoj: 265 kongresanoj iris al Walcheren; 200 vizitis la Delto-laboregojn; 250 preteris Amsterdamon kaj 40 veturis laŭ la Norda Fermdigo.

Parolante pri la Komitataj Kunsidoj de U.E.A. ni diru ke estis elektata nova estraro por periodo de tri jaroj. Tiu ĉi nun konsistas el jenaj estraranoj, inter kiuj la leganto legos la nomon de nia ĝenerala prezidanto, novelektita estrarano:

Prezidanto: D-ro Prof. Ivo Lapenna, (Britujo) ĝis nun ĝenerala sekretario;

1-a Vicprezidanto: S-ro E.L.M. Wensing, (Nederlando), kiu speciale prizorgos la propagandon eksteran;

2-a Vicprezidanto: S-ro Carlen (Svedujo), kiu okupiĝos pri modernaj metodoj en nia informado;

S-ro G. Becker, (Germanujo), ĝenerala sekretario (ĝis nun prezidanto de TEJO);

D-ro A. Albault (Francujo), estrarano pri kulturaj aferoj kaj redaktoro de "Monda Kulturo";

S-ro Maur. G. D. Jaumotte (Belgujo), ĝenerala prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, estrarano pri la landaj kaj fakaj asocioj kaj delegita reto de UEA (\*\*);

S-ro Jozef Toczyski (Polujo), kiu zorgos pri la lerneja branĉo;

S-ro E.J. Woessink (Nederlando), estrarano pri financoj.

Krom tio, la Komitato decidis ke reprezentanto de TEJO (S-ro H.R. Tonkin, — Britujo —) rajtos ĉeesti la estrarajn kunsidojn, kun ĉiuj rajtoj, krom la voĉdonrajto, kaj renovigis la mandaton de S-ro Grég. Maertens, kiel kontroliston de la financoj de la C.O. de Rotterdam. (\*\*)

La Kongresanoj, post aplaŭdo de ĉiuj la cititaj gvidantoj aparte, ankaŭ aplaŭde konfirmis la decidon de la Komitato elekti S-ron Holmes, Honora Prezidanto de UEA. La edzino de S-ro Holmes ricevis, kun florgarbo, ankaŭ longajn aplaŭdojn de la ekstarinta ĉeestantaro.

Dum tiu ĉi kongreso du laboraj kunsidoj pritraktis du tre gravajn temojn: "Eduka Valoro de instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj" kaj "Aplikado de modernaj metodoj en la informado pri Esperanto".

La konkludoj de la unua estis ĉefe ke:

- a) Esperanto povas esti ellernita almenaŭ 4-5 fojojn pli rapide ol iu ajn nacia lingvo; en multaj kazoj 10-15 fojojn pli rapide ol la pli malfacilaj naciaj lingvoj;
- b) la rezultoj atingitaj per Esperanto-instruado montras, ke precipe en kazoj de mallongaj kursoj, la atingita uzebla scio de Esperanto estas konsiderinde pli granda ol la scio de aliaj lingvoj.
- c) la instruado de Esperanto helpas al lernado de aliaj naciaj lingvoj;
- d) la instruado de Esperanto helpas al lernado de aliaj lernobjektoj, precipe de geografio kaj historio.

(\*\*) Tiun ĉi jaron, la Komitato entute devis esti renovigata. Kaj en la nova Komitato Belgujo estas reprezentata de S-ro Maur. Jaumotte, Komitatano A. kaj de S-ro Grégoire Maertens, Komitatano C. la kooptita de la aliaj Komitatanoj.

En la dua, D-ro Lapenna substrekis ke la ĝisnunaj metodoj ne estis taŭgaj, ekz. la tro ofta apliko de verdaj steloj kaj sloganoj. Ni devas objektivite informi; diri la veron pri Esperanto kaj montri la faktojn. Ni popularigu Esperanton; kreu bonan favoron kaj ne agu kiel stranguloj.

El la diskutoj estiĝis kelkaj valoraj proponoj: eldoni en kelkaj naciaj lingvoj bonegan broŝuron "Moderne Menschen sprechen Esperanto", per kiu propagandas la Germana Asocio; detaligi la principaron de Frostavallen kaj normaligi la propagandan materialon; fondi aŭtomobilistan fakan organizon (komisiita al S-ro Jaumotte); ellabori bazajn prelegojn por diversaj kategorioj de aŭskultantoj: lernantoj, junuloj, studentoj, fakoj, elito, ktp; uzi la valoron de bioskopa reklamo, kiu laboras, dum ni dormas (S-ro Maertens); ellabori filmeton kun desegnaĵoj por la infanoj.

### 8-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo

Sub la temo "Stato kaj Ideologio" okazos la 8a Internacia Seminario de GEJ de la 27a de decembro 1964 ĝis la 3a de januaro 1965 en Nürnberg. Prelegos interalie Prof. Lucien Laurat, Parizo, kaj s-ro Ivo Osibov, Split. Promesis ankaŭ prelegi prof. d-ro Ivo Lapenna. La aliaj prelegontoj venos el Germanujo, Svislando, publikaj arangoj en Nürnberg kaj Fürth, kaj la jam fame konata SILVESTRA BALO.

Estas favoraj kotizoj, krome gejunuloj malpli ol 25-jaraj ricevos dum la seminario 15,— GM. Al ili estos repagata duono de la vojaĝkostoj sur la teritorio de la Federacia Respubliko Germanujo. Informojn donas: Germana Esperanto-Asocio, Poŝtfako 2113, 85 Nürnberg 2, Germanujo.

Parolante pri infanoj, ni substreku ke, — mezvoje inter Hago kaj Rotterdam —, malfermiĝis en "De Tempel" (Overschie): Infana Kongreseto, kiun partoprenis 38 knabinoj (inter kiuj unu belgino: Rita Thibau (Antverpeno), 29 knaboj, 9 gvidantoj kaj 12 gepatroj. Tiuj infanoj ĉeestis parteton de la inaŭgura ceremonio, dum kiu ili ĉiuj venis sur la podio, dum unu el ili parole salutis la Kongreson. Merkrede okazis cetere vizito de la plenkreskuloj al la kongreseto, kaj vendrede, la infanoj prezentis en la kongresjo skeĉojn, dancojn kaj kantojn kaj akiris merititan sukceson.

Same okazis en konferenceto "Overvoorde" (kie ni havis antaŭ du jaroj la Beneluksan Kongreson): la 34a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

Kaj, en la kadro de la Somera Universitato, estis antaŭ-viditaj prelegoj de diversaj eminentaj esperantistoj: Prof. Juan Régulo Perez, Gaston Waringhien, Sin'itiro Kawamura, Ivo Lapenna, Pancer, John Wells kaj Vasil Peevski.

Kiel ĉiujare, la Internacia Arta Teatro, prezentis dum oficiala Teatra Vespero: "La Amo de Don Perlimplino" (F. Garcia Lor-

ca) kaj "Edziĝpropono" (A.P. Ĉeĥof), kaj, dum libervolaj prezentadoj: "La Morto de lia Ekscelenco" (M. Matkoviĉ), "Sen Eliro (J.P. Sartre), "Hanibalo" (V. Kljakoviĉ) kaj "La Leciono" de E. Ionesco.

Estas vere kuraĝige, ke ne nur la oficiala vespero (al kiu estas invititaj ĉiuj kongresanoj) sed ankaŭ la du aliaj, por kiuj enirprezo estas postulata, venigis multajn interesitojn, kiuj ĉiujfoje plenigis la festosalonon.

Ankaŭ la persona sukceso de la cetere bonegaj artistoj estis tre granda.

Krome okazis "Distra Vespero" en "Dierentuin", por kiu, unufoje pli, estis amasa elmonro de interesiĝo.

Fine ni diru ke, kiel ĉiujare, S-ro Cseh gvidis seminarion, en kiu li instruis sian metodon kaj kiun sekvis, tiun ĉi jaron, ankaŭ Prof. Vanbreuse, el Verviers, kiu tamen jam tiom da kursoj mem gvidis en sia Ateneo. Bela pruvo de sindonemo kaj perfektigiemo!

Ankaŭ oratoraj kaj belartaj konkursoj estis organizitaj. Sed ekster tio, — kaj tio mankis dum nia Kongreso en Bruselo, precipe pro la tiamaj okazintaĵoj en Kongolando, — okazis, en la belega salono de "Binnenhof", en la Nederlanda Parlemeento, en tiu salono en kiu la Reĝino legas ĉiujare la tron-paroladon, grandioza akcepto, fare de registaro kaj urbestro de Hago.

Ĉiuj la du mil kvincent kongresanoj estis tie regalataj, ne per belaj promesparoloj, cetere jam eldiritaj ĉe la inaŭguro, sed per la plej bonaj vinoj kaj holandaj alkoholaĵoj, plej delikataj sandviĉetoj kaj dolĉaĵoj, tiel ke neniu atentis la preterpasantajn horojn, en pluralo.... Tiu bela akcepto efektive daŭris pli ol du horojn!

Per ĉiuj tiuj ĉi tre resumaj citoj de la plej gravaj okazintaĵoj, la neĉeestintoj estos konstatintaj ke... vere, tiun ĉi fojon, la neĉeestintoj malpravas.... Ili malpravas des pli multe, ĉar la kongreslando kaj — urbo estis najbaraj; do tre apudaj al niaj loĝlokoj.

Kaj tiurilate ni ja povas bedaŭri ke la belga delegitaro estis, tiun ĉi jaron, malpli multnombra.... ol pasintjare, en la fora Sofio!

Sed la ĉeestintoj tre certe dezirus substreki per granda kapjeso, nian dankvorton direktitan al ĉiuj tiuj L.K.K.'anoj kaj helpantoj, al kiuj, publike, estis direktata la dankemo de ĉiuj, dum la Ferma Kunsido; tuj antaŭ ol S-ro Holmes transdonis la prezidantan martelon al la nova Prezidanto, D-ro Lapenna, kaj bele vestita holanda kamparaneto la Kongresan Flagon al la delegitino de la morgaŭa kongreso de Tokio.

Ĉar ĉe ni vere, — kiam Kongreso mortis, — ni rajtas krii: "Vivu la Kongreso!"

Kaj tiun krion ni al diras hodiaŭ kun ĝoja memoro al la pasinta kaj, kun granda espero por la estonta.

Ĝ. P.

Grava Tasko atendas nin en 1965

## JARO DE INTERNACIA KUNLABORADO

### JARO DE L'INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Ne jam estas la kalendara Novjaro, sed alvenis tamen la momento, kiam ni ĉiuj devas pensi pri la laboroj entreprenotaj en la nun komenciĝanta propaganda jaro.

Kaj, je tiu ĉi preciza momento, ni tuj kaj tutspeciale volas atentigi ĉiujn niajn legantojn, ĉiujn esperantistojn en la lando, kaj ankaŭ ĉiujn esperantemajn personojn, kiujn ni povas atingi, pri grava propagando al kiu ĉiuj, individue, nepre devas partopreni.

Ĉiu memoras ankoraŭ la gravan klopodon, faritan antaŭ kelkaj jaroj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, kiam dekmiloj kaj dekmiloj da esperantistoj subskribis folieton, per kiu ili rekomendis al la U.N. la enkondukon de Esperanto.

En 1965 prezentiĝos okazo por renovigi tiun propagandan eksperimenton.

Efektive, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis proklami la jaron 1965, okaze de la 20a datreveno de la fondiĝo de U.N.: "Jaro de Internacia Kunlaborado".

En la kadro de U.N. estas tiucele formita aparta Preparakomitato.

La Prezidanto de tiu Komitato petis diversajn neregistarajn organizaĵojn en konsilaj rilatoj kun U.N., kontribui, kiel eble plej multe, al efika antaŭenigo de la celoj difinitaj por tiu jaro.

La ĉefa ideo estas, ke "Internacia Kunlaborado prezentas unu el la plej efikaj rimedoj por dispeli internaciajn tensiojn" kaj ke la 20a datreveno estas taŭga okazo por vastigo kaj fortiĝo de internacia kunlaborado sur ĉiuj kampoj.

La estraro de U.E.A. kompreneble akceptis la inviton donisian helpon al U.N. en tiu klopodo kaj informis pri tio la Sekretariaton de U.N.

La estraro ankaŭ opiniis ke la Jaro de Internacia Kunlaboro prezentiĝis kiel vere taŭga okazo por atentigi U.N. kaj la Ŝtatojn-Membrojn pri la Internacia Lingvo kaj, post interkonsiliĝo kun la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj komitatanoj, ĝi unuanime decidis entrepreni apartan kampanjon dum 1965 kaj organizi amasan subskribigon de "Propono" al U.N. okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado.

La estraro de Belga Esperanto-Federacio, dum speciala studtago (dimanĉon, la 13an de septembro en Bruselo) pridiskutos la plej bonan manieron organizi tiun specon de referendumo, ankaŭ en nia lando.

Intertempe, ĉiuj ĝiaj membroj tamen sciu pri kio vere temas:

Je la fino de la Universala Kongreso en Hago, komence de aŭgusto, estis akceptita "Rezolucio".

Nu, la estraro de U.E.A. jam presigis tiun tekston, kun la nura diferenco ke, — anstataŭ la komencvortoj de la 2a paragrafo "la 49a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Hago de la 1-8a de aŭgusto 1964, kiun partoprenis pli ol 2500 reprezentantoj el 43 landoj de ĉiuj kontinentoj" —, oni legas la simplan pronomon "NI nun proponas".

Kaj estos folietoj, kun tiu teksto, kiun ni nun solene alvokas vin, ne nur mem subskribi, sed subskribigi de ĉiuj viaj familianoj kaj amikoj, kaj aliaj simpatiantoj, kiujn vi konas.

Belga Esperanto-Federacio jam mendis milojn da tiaj folietoj, entenantaj la "Proponon" kun, flanke de la Esperanto-teksto, ankaŭ tiu en niaj du naciaj lingvoj, aparte.

Grupoj kaj individuoj povas do, ekde nun, mendi tiajn foliojn, aldonante ĉu ili deziras ilin kun flandra aŭ kun franca teksto.

Tiuj folioj estas senpage haveblaj, sed ni esperas ke ĉiu volos per aldono de respondkupono aŭ alimaniere, ne nur kovri la sendkostojn, sed helpi al la plivastigo de tiu ĉi kampanjo, kiu devas esti sukceso.

Dorsflanke, la folietoj entenas instrukciojn, kiujn ni petas ĉiujn atente legi kaj nepre agi konforme al tiuj instrukcioj.

La kolektado de subskriboj devas esti finita, ekzakte post unu jaro, en oktobro 1965, por ke la "Propono" povu esti prezentita al U.N. antaŭ la fino de 1965.

Sed tio ne signifas, ke restas al ni tro multa tempo por organizi nian kampanjon... Ne nur la estraro de B.E.F., sed la Komitatoj de ĉiuj grupoj, jam de nun, ja urĝe studu la manieron, laŭ kiu ili intencas helpi al la disvastigo de la "propono".

Ĉiu memoru ke kiam, en 1948, U.E.A. organizis similan kampanjon, ni kolektis ĉirkaŭ 16 milionojn da subskriboj, kiuj formis vere la bazon de la sukceso atingita, kelkajn jarojn poste en 1954, — ĉe UNESCO, kiam tiu ĉi akceptis rezolucion favoran al nia lingvo.

Kaj do zorgu ke, en 1965, la sukceso estu ankoraŭ multe pli granda!

La tuta estraro de U.E.A., tiu de B.E.F. kaj la subskribinta persone estos dankaj al ĉiu, kiu kunlaboros por tion atingi.

MAURICE JAUMOTTE

Ĝenerala Prezidanto de B.E.F.

Estrarano de U.E.A.

# KRUCVORTENIGMO No 10

|    |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|
|    | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
| 1  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 2  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 3  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 4  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 5  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 6  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 7  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 8  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 9  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |
| 10 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |

## Difinoj

### HORIZONTALALE :

- 1) en kanto « ŝi ekstaris je la pord' » + o.
- 2) inklinon atente rigardi.
- 3) pronomo - efektiva
- 4) Frakci' - kovril'
- 5) besta kiso - kiu havas rezultaton.
- 6) suda lando - sufikso
- 7) dufoje sama litero - moka dirmanier'
- 8) kruro kaj femuro - duono de « kontrolo ».
- 9) metal' - en kiu dirita loko.
- 10) deziro ricevi honorinsignon.

### VERTIKALE :

- 1) Esperanto estu...
- 2) kle (en latina) — nomo de vulkano.
- 3) sen ĝi nia lingvo nur estus peranto — horo de multaj kunvenoj — diktator' de multaj virinoj.
- 4) per la helpo de instrua paperfoliaro.
- 5) ne revene — sovaĝa bovo.
- 6) loko kie oni aranĝas geedziĝojn — Rilativa vort'.
- 7) transsendi voĉon.
- 8) krei bildojn — per kolora fluidaĵo.
- 9) nomo de litero — konjunkcio — kun « io » aldonita : imitema besto.
- 10) sonlito.

- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
- 2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
- 3) Sendu NEPRE vian solvon al : Ch. Poupeve, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unaj tagoj post la apero.

K R U C V O R T O J  
 V A Z O - M E N D U  
 A D U L T A N T - B  
 D I R O - R E - S I  
 R O P - - O G - O L  
 A L E O J - A L I E  
 T O M - E - T I F A  
 E G O I S M O - F N  
 T - - T O - - V - T  
 O P O R T U N E C O

### SOLVO DE LA PROBLEMO N° 9

Inter la diversaj ensendaĵoj, sep seneraraj de :  
 Sro. Couwenberg, Blankenberge; S-ino De Hondt,  
 Antverpeno; F-ino Sim. Opsomer, Bruselo 4;  
 Sro. J. Van Eynde, Wilrijk; Sro Iserentant,  
 Bruĝo; F-ino E. De Coene, Ekeren, kaj du kun  
 eta(j) eraro(j) de Sro M. De Neyer, Bruselo 15,  
 kaj S-ino E. Ernst, Bruselo 9.  
 Lotumado, dum kunveno BGE 9/6/64 aljuĝis la  
 libropremion al Sro Couwenberg.

## LA INTERNACIA TURISTA KAJ KULTURA FERIO EN LA KASTELO DE GRESILLON (2 gis 19 julio '64)

Tiu jam famkonata aranĝo havis denove grandan sukceson ; kvankam la eksterlanda partoprenantaro ne estis tiel multnombra kiel pasintjare. Kiuj ne ankoraŭ travivis ĝin, ne povas imagi la agrablegan trankvilon kiu regas tie kaj la ripozon kiun oni ĝuas tie. La tuta grafolando Anĵuo estas tre bela kaj speciale la kasteloj kaj ĉirkaŭaĵoj estas ravaj. Sufiĉe riĉa biblioteko pruntas esperanto-legaĵojn al legemuloj. Estus tamen dezirinde ke niaj eldonistoj de tempo al tempo sendu donacon al la kulturdomo por rekompenci tiujn humilajn sed energioplenajn laborantojn ; pripensante sampempe ke tio estus propagando por ilia entrepreno. Ĉiutage estis konferenco. Drs. F. Roose el Brugge donis la jenajn : 1) Kio estas arto ? ; 2) Evoluo de la arto de la Renesanco ĝis la 20a jarcento ; 3) La arto de la 20a jarcento (kun multaj diapozitivaj) ; 4) Historiaj originoj de nuntempaj problemoj en Belĝujo ; 5) La historio en la instruado. S-ino Roose : Kiel resti juna. La teksto de ĉi lasta aperos en "Kulturaj Kajeroj". S-ino Cheverry, en serio da prelegoj konigis la Anĵuan landon en la historio, ekonomio, turismo ktp. S-ino Leroux donis du konferencojn pri la nomadoj en la Saharo. Dr. Boulogne donis tre interesan paroladon pri labormedicino. Ĉiufoje la saman tagon okazis debato pri la konferenco. Pruvo pri la granda interesiĝo : oni devis ĉiufoje plilongigi la debatotempon. F-ino Ingrid Roose ilustris la konferencon de la patrino per fizikkultaraj movoj. Okazis ankaŭ la jenaj ekskursoj : 1) tuttaga al la kasteloj de la Loire. Tiuokaze ni vizitis ankaŭ la abatejon de Fontevault kaj la preĝejon de Cunault. 2) duontaga al Angers, kun la Ardezminejoj, la kastelego de Sankta Ludoviko, la antikva kvartalo kaj ankaŭ la pentrajmuzeo kiu estas tre riĉa en primitivuloj kaj en 18a jarcentaj pentraĵoj. La sinjoro konservatorio speciale bonvenigis nin kaj akordis senpagan viziton. 3) la son — kaj lumludo en la kastelo de Le Lude, kiu daŭras 1,45 H. kaj kiu estas eksterordinare bela. 4) la zoologia ĝardeno de La Flèche. La regionaj ĵurnaloj publikigis artikolojn kaj fotojn. Ĉiun vesperon estis ankaŭ iu distraĵo. La Hamburganoj, ges. Wielguss s-inoj Kogel kaj Günther kaj s-ro Hans Schutt prezentis Hamburgan vesperon. Okazis ankaŭ tute improvizita skizo pri vojaĝo al kaj kongreso de Sofio, interrompita per montrado de diapozitivaj vidoj de tiu kaj de aliaj urboj. La ludantoj Drs. F. Roose, Dr. Boulogne kaj S-ino Cheverry rakontis humorplene pri siaj travivaĵoj. Ni admiris ankaŭ la unuan esperanto-filmon : "Angoroj". Ĝi vekis kompreneble tre grandan interesiĝon. Ĝi daŭras unu horon kaj estas rakontaĵo à la Hitchcock. La bildoj pri Parizo estas tre belaj. La komentario de Prof. Waringhien tre bona ; la rakonto mem tre streĉa. Nur unu rimarko : la interparoladoj estas iom arte-

faritaj ĉar malrapidaj. Tion faris la geaktoroj pro evidenta zorgo ke ĉiuj bone komprenu. Ludo ankaŭ tre bona. Tiu filmo havu sukceson... kaj sekvon. Aliaj esperantigitaj filmoj estis ankaŭ montrataj. Kelkaj kuraĝuloj enordigis tute la Volley-ballteronon, tiel ke oni ĉiutage povis ludi. Poste ni iris al la naĝbaseno. Do, vi vidas ke tie estas ĉio por kontentigi ĉiujn.

Dimanĉon 12an de julio, post konversacio pri la esperanto-literaturo, estis bele aranĝita ekspozicio. S-ro Roose donis multajn detalojn pri kelkaj noroj. Sufiĉe multaj poste aĉetis unu aŭ plurajn verkojn. La 14an, oni grupe ĉeestis la nacian feston en Baugé.

La ferio daŭris 17 tagojn, kaj tamen estis multe tro malmulte. La disiro estis plena de nostalgio. Ni revenos, kiel ni kantis en la adiaŭa kanto. Ni devas danki multajn, sed ĉefe gesinjorojn Chevrery kaj Leroux. Vivu Grésillon. Unu kiu ĉeestis.

### FRANCUJO

Vizito de punt-fabrika kaj esperantista renkontiĝo okazos dimanĉe la 4an de oktobro en la Nord-Franca urbo Caudry. Belgoj kaj alilandanoj estos bonvenaj. Informejo : Esperanto, 3 Rue de Saint Quentin, Caudry (Nord).

Krome, E-tago okazos en la kadro de la venonta franca-belga foiro de l'komuna merkato en LILLE (24a de aprilo - 9a de majo 1965).

L. Giloteaux, 7 Rue Saint Saëns,  
Wattrelos (Nord) FRANCE

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
telefono 37.88.20

post mia elekto kiel

ESTRARANO DE U.E.A

Unu el la ĉeestintoj de la 49a Universala Kongreso en Hago verŝajne jam informis vin, Kara Leganto, ke S-ro Gr. Maertens kaj mi, — por nova periodo de tri jaroj, — estos Komitatoj de U.E.A. ; ke S-ro Maertens ankaŭ daŭrigos sian financ-kontrolan laboron en la Centra Oficejo de Rotterdam ; kaj ke mi estas elektita en la nova estraro, kun la speciala tasko ekagi kiel " **estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj deligitaro-reto de U.E.A.** "

Okaze de miaj 65 jaroj, mi, — antaŭ nelonge, — decidis iomete simpligi mian profesion laboron, en kiu mia filo, almenaŭ parte, helpas min.

Se mi do akceptis la certe ne, — antaŭ la kongreso —, antaŭvidatan honoron... kaj laboron ne estas kun la intenco rezigni aŭ neglekti la taskojn, kiujn mi, ĝis nun, plenumis kaj plenumas en la lando mem, ĉu en mia Grupo "La Verda Stelo", en Antverpeno, ĉu en la Federacio.

Mia celo, kiu ankaŭ devas esti tiu de ĉiuj vi, estas ke la grupoj ne stagnu ; ke, kontraŭe, ilia plivigliĝo, kresko kaj plimultnombriĝo alportu al nia Federacio pli bonan, pli belan vivon.

Kaj estas por tion atingi, ke mi, — en tiu preciza momento kiam mi ekplenumos novan taskon —, direktas solenan alvokon al ĉiuj, kiuj ĉirkaŭas min en diversaj funkcioj kaj al la multaj aliaj, kiuj povUS akcepti taskon, sed iom facilanime pretekstas mankon de tempo aŭ de cbleco, ke ĉiuj serioze pripensu ke, — antaŭvide al la speciala jaro 1965 : jaro de internacia kunlaboro, jaro de internacia lingvo —, ĈIUJ devUS, mi prefere dirus : devAS helpi !

Mi esperas ke tiu ĉi mallonga alvoko de via ĝenerala prezidanto ne estas vana kaj ke, en diversaj regionoj de la lando, novaj kunhelpantoj leviĝos por daŭrigi kun ni la laboron, atendante ke ili povu ĝin plene transpreni.

MAURICE JAUMOTTE

LES ENTREPRISES

## DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3  
Tel. : 16.89.92

Entrepreno de  
KONSTRUAĴOJ

## G. FAES

Eiermarkt, 21  
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO  
RADIO kaj GRAMOFONO

# RE CENZ OJ

Okaze de la Madach-Centenario, H.E.A. (Hungara Esperanto Asocio) intencas aperigi la duan eldonon de "La Tragedio de l'Homo" dramoemnon de la antaŭ 100 jaroj mortinta Emeriko Madach la fame konata hungara poeto, en la majstra traduko de D-ro Koloman Kalocsay.

La koncerna eldonejo akceptis nian proponon kun komprenemo, tamen por realigi nian planon estas bezonata ankaŭ via bonvolo. Nome: la eldonejo deziras havi garantion de H.E.A. pri la pretendo de la eldonoto kvanto fare de la internacia esperantistaro. Komprenoble ni povos plenumi tion nur pere de via helpo. **Laŭ tio ni petas bv. sendi vian antaŭmendon** al "Kultura" Könyv — és Hírlap Kúlfkereskedelmi Vallalat, Budapest, I., Fő-utca 32, Hungarujo.

Prezo de la eldonoto libro — kun moderna eksterajo, en formato 14 x 21 cm., sur bona papero — estos ĉ. 2.20 US. dol-j. Pri la pagmeniero la mendintoj ricevas precizan instrukcion ĝustatempe. La libro aperos antaŭvideble en decembro ĉ.j.

**Porstelnn Fra Hamri: « Sub Stelo Rigida ». El la Islanda lingvo tradukis Baldur Ragnarsson. Eldonis Stafeto en la serio de la Beletraj Kajeroj. 132 paĝoj. Prezo: 20 Us. Dol.**

Kiam mi finlegis tiun poemaron, mi havis ankoraŭ neniun noton sur mia papero. Mi relegis. Sama rezulto. Sed staris antaŭ mia spirito multaj demandoj kaj kelkaj supozoj. Mi ekzemple supozas ke ĝi estas poezio. Alie mi ne komprenus ke iu kiel B. Ragnarsson tradukus tion kaj ke iu kiel Juan Regulo eldonus tion. Sed tiam mi demandas al mi: kio estas poezio? En kio konsistas la poezio en tiu-ĉi libreto. Se mi ankoraŭ flankenŝovas la du ecojn de poezio: « interesa laŭ enhavo; bela laŭ formo », ĉu tiu-ĉi kolekto al mi ion « diras »? Aŭ almenaŭ, ĉu ĝi ion « diras » al la homoj? Se malmultaj pecoj en ĝi frapas min interne, ĉu la kaŭzo estas ke ĝi aspektas fremda al mi? Tio volas diri ke estas por mi malfacile por samsenti, kaj do por kompreni. Sed en tiu kazo, kiel eblas ke centprocente Flandra poeto kiel G. Gezelle trovis eĥon en tiel vastega, internacia rondo (ekzemple ĉe la Ruso Anton Ĉehov)? Aŭ ĉu tiu-ĉi poemaro estas ankaŭ « plej individueca esprimo de plej individueca emocio » (Willem Kloos)? Jen ekzemplo de tio mi nomus ne-poezio, sur p. 113:

|                          |                           |
|--------------------------|---------------------------|
| Antaŭ longe              | post nun                  |
| vi faris al iu inviton   | vi povos nur peti lin     |
|                          | prognozi pri la vetero    |
| jom poste                |                           |
| li venis                 | kaj eble tio              |
| sed vi ankoraŭ ne        | estas ĝuste la plej grava |
| alparolis lin            | kiu scias                 |
| kaj nun                  |                           |
| li pretigas sian foriron |                           |

(noto: mi ne forgesis majusklojn nek leĝsignojn, ĉar ne enestas)

Mi ne volas diri ke ĝi estas (tute) sensignifa. Sed la lastaj tri linioj detruas ĉion (laŭ miaj kompreno kaj sento).

Inter la multegegaj modernaj artistoj estas ankaŭ ĉarlatanoj kaj inter

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“. (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140.

iliaj verkoj estas ankaŭ ĉarlatanaĵoj. Mi emas katalogi jenan poemon en tiu kategorio, kvankam la aŭtoro eble nur volis esti originala. Povas esti ke li volis meti iun ideon en ĝi; sed la rezulto estas, nu kio? Burleskaĵo? Juĝu vi mem. Paĝo 52 « Tutmosis III »

« En nokto malluma mi sonĝis pri tutmosis tria

li kaŭris ĉe l'itorando kontraŭ volo mia

li nigris kiel peĉo

kaj diris kun mienknedo

mi venkis hieraŭ la altojn de palestino

jam saltis li for ĉar mi petis pri cigaredo. »

(noto: aŭtoro aŭ eldonanto povus meti klarigon ĉe la titolo; ja ne ĉiu estas devigata scii ke temas pri unu de la plej grandaj konkerantoj de antikva Egiptujo).

Mi konscias ke mia juĝo estas severa. Aŭtoro kaj leganto sciu iliaŭvice ke estas multege da subjektiva impresoj en la juĝado de poezio. Se doni ekzemplon. Unu de la de mi plej ŝategataj poeziaĵoj estas la fama preĝo de St. Francisko: « Dio, faru min instrumente de Via paco... ». Nu, unu de niaj plej grandaj literaturistoj, G. Walschap juĝas ĝin... tri tonojn tro alta deklamaĵo de foruzitaj banalaĵoj... » (« Muzick voor twee stemmen » p. 221). Do, neniuj afliktigu tro pro mia juĝo!

Post legado de poemoj de la tradukinto, mi ne miras ke li ŝatas tiujn de P.F. Hamri. Sed inter liaj ne — aŭ malfacile kompreneblaj poemoj estas ankaŭ aliaj tre tre belaj. Dum ke ĉe Hamri ili estas preskaŭ ĉiuj... « strangaj ». Mi estas tamen feliĉa povi diri ke estas ankaŭ belaj aferoj en la kolekto. Mi ekzemple tre ŝatas « Okuloj » sur p. 34. Kaj estas ankoraŭ aliaj same belaj. La dekoracioj de la edzino de la aŭtoro estas ankaŭ tre belaj; sed mi ne scias ĉu ili estas klarigaj rilate la tekstojn.

Finaj rimarkoj. Oni ne plu eldonu tiajn poemarojn sen akompananta stud-artikolo pri aŭtoro kaj pri lia verko. Se B. Ragnarsson tradukis, li certe havis motivojn kiujn mi esperas esti literaturaj. Do, kial li ne klarigis por la leganto la signifon kaj la poeziecon de tiu-ĉi verko? Ĉiukaze, mi kredas ke mi ne eraras se mi diras ke ĝi estas pli interesa por kiu studas ol por kiu ĝuas poezion.

Drs. F. ROOSE

**Raymond Schwartz: « Kiel Akvo de l' Rivero ». Romano. 488 paĝoj. Eldonita de « Stafeto » en La Laguna de Tenerife sur la Kanariaj Insuloj. Prezo: 3 Us. Dol. por la broŝurita kaj 3.80 Us. Dol. por la tolbindita eldono. Aperis kiel duobla volumo en la Bel-literatura serio.**

Kiam Pierre Touchard, la ĉefa persono en la romano, klopodas komprenigi al Franco la sentojn kaj vidmanieron de la Germanoj, tiam S-ro Dulong diras: Kio ni estas entute? Nur guteto da akvo en granda riverego. Neniu povas iri kontraŭ la fluado... Tio estas la komuna destino de l'homaro. Ni estas kaptitoj de nia ĉirkaŭaĵo, ne nur korpe, sed ankaŭ ĉefe, mense. Kiel akvo de l'rivero... « Sekvas tiu belega komparo inter Rodano kaj Rejno. Jen la titolo de la libro; kaj ĝia klarigo. Elstaraj paĝoj el romano kiu efektive, plurloke, estas elstara. Ke R.S. kapablas skribi, tio estis evidenta jam longe antaŭ la apero de tiu-ĉi libro. Nun ni scias ankaŭ ke li kapablas konstrui romanon. Ĝi rakontas la travivaĵojn de Franco, P. Touchard, de antaŭ la unua ĝis post la dua mondmilitoj, en kelkaj partoj de Francujo kaj ankaŭ en Berlino. Kvankam perfekte konstruita, tiu libro estas tamen iom malegala, en tiu senco, ke kelkaj epizodoj estas tro longe pritrakitaj, dum ke aliaj tempoj estas mallonge pritrakitaj. Entute la romano povis esti pli mallonga. Kaj per tio ĝi estus gajninta pli da valoro. Iuj paĝoj estas tute superflua; ekz. p. 289. Antaŭ ĉio R.S. estas komikulo! Kun ŝatprefero li longe disertacias pri scenoj en kiuj li povas moki, evidenti la « malgrandajn » ecojn de la homoj, ktp. Priskribo de festo, de deĵoranta policano k.a. estas preferataj temoj. Ie kaj tie li pensigis min al Ernest Claes; ankaŭ al Georges Courteline. Eĉ la tiel dramecan interparoladon inter juna Germana Naziisto kaj lia patrino li devas turni en finan komikadon aŭ eĉ burleskajon (p. 452). Liaj legantoj scias kia grandioza vortjonglito li estas; kaj kiajn efektojn li povas atingi per tiu procedo. Nu, la sama tie-ĉi.



Sed ĉi-foje per la intermetado de unu aŭ pluraj literoj ĉu en unu ĉu en pli da vortoj. Ekzemplo. En Berlina studenta festo, iu Rejnlandano estas iom provokata, sed, tre ŝerckapbla homo, li konfuzas la Berlinanojn per la lakona diro: en Rejnlando multaj kasteloj; ĉe vi stultaj kameloj. Mi ne mencias la plej komikajn nek la « spicitaĵn » kiel sur p. 195. Unu de la grandaj literaturaj atutoj (se mi rajtas tiel esprimi!) de Guy de Maupassant estas ke li majstre kreas la ĝustan atmosferon en kiu vivos kaj agos la « herooj ». Nu, tion mi malkovris foje ankaŭ ĉe nia verkisto; ekz. sur p. 129. Ĝi estas ankaŭ modelo de atmosferkreado. Kaj kia talento de enbildo de homaj faroj! « Ce Annemarie la amikinoj povis brui kaj klaĉi senretene kaj ŝaŭmi super ĉiujn digojn... ». Maŝtra priskribo ankaŭ de tiu Sankta Nokto sur p. 207-8; kun, kompreneble, la nemalhavebla komika noto: « Ĉiuj vizagoj lumadis kaj aparte la nazoj » (!).

Poeto aŭ literaturisto, kiu estas tio de el naturo, estas ankaŭ kreanta lingvo-artisto. Tion ni konstatas ankaŭ en tiu-ĉi romano, plurloke. Trafis min ekz. lia esprimo « Krome kaj krone » por: « last but not least ». (p. 128). Mi kredas ke li kapablas envortigi ĉion kion li volas, scias aŭ sentas; nur unu ekz.: « li estis deĵoranta nur ekvespere ». Alia valorajo de tiu-ĉi romano estas ke ĝi konsistigas psikologian tempodokumenton. Por ke oni povu kompreni la faktojn de la historio, estas necese koni la atmosferon en kiu tiuj faktoj okazis. Tiu atmosfero, Germana-Franca, en 1913, estas tre bone donita sur p. 216-217. Legante tiujn kaj aliajn paĝojn, mi ofte demandis al mi mem kion pensas niaj Germanaj samideanoj pri tiu libro. Sed mi supozas ke ili povas plene konsenti se ili legas poste paĝojn kiuj atestas pri ekzempla malŝovinismo kiel p. 380. Ankaŭ la diferencigo de spiritostato de 1914 kaj de 1939 estas bone montrita.

Mankas nur unu afero por ke tiu romano estu altnivela mondliteraturaĵo. Sed ĝi estas esenca! En ĝi ne estas psikologia profundeco. Ĉio restas ĉe la supraĵo, psikologie; malgraŭ la fakto ke la libro estas tiel bone konstruita ke ĝi ofertas la eblecojn de psikaj profundigoj en la dramecaj personoj. Kia ebleco kiel tiu interparolado inter filo kaj patrino sur p. 450-1. Foje ĝi estas bona sed tiam ni devas legi banalajn jam cent fojojn ripetitan kiel ekz. « Ho, kial vi estas mia patrino » (!). Imagu ke A. Koestler estus verkinta tiun parton! Ĝi certe estus iĝinta korpremega... kaj rivela rilate homajn konfliktojn, konvinkigojn kaj agojn.

Ankoraŭ rimarko koncerne la stilon. R.S. montras strangan diferencon. Foje li estas rekta, tute moderna. Alian fojon li estas komplete malmoderna. Ekzemplo: la paĝoj 287-88 estas deknaujarcentaj! Ili povus esti prenitaj el romano de A. Dumas.

Piednotoj donas klarigojn kelkfoje necesajn. Sed devis esti piednoto ankaŭ por la traduko de « grosse légume »; la nura traduko en dika legomo (p. 334) ne sufiĉas.

Konklude: ekzistas ne dubo ke la esperantistaro legos kun grandega plezuro tiun plej ampleksan verkon de R. Schwartz. Ĝi estas valora; havas tre multajn meritojn; kaj estas granda paŝo antaŭen sur la vojo de nia originala literaturo.

Drs. F. ROOSE

RABATO POR ESPERANTISTOJ

## GRUPA VIVADO

**ANTVERPENO**  
Esperanto-grupo "La Verda Stelo"  
Kunsidoj: Ĉiuvendrede en  
"Witte Leeuw" Frankrijklei, 4  
je la 20.15a h.  
Poŝtĉeknumero: 726.54 — Deurne.

### NEKROLOGO:

Pro subita akcidento dum sia laboro la frato de F-ino A. Enzlin mortis. Al nia kara membrino kaj parencoj ni esprimas niajn sincerajn kunsentojn en la profunda funebro.

### GEEDZIGOJ:

Kun plezuro ni konigas la geedziĝon de ambaŭ niaj membroj S-ro Paul De Roover kun F-ino Raymunde Klein. Al la juna paro, al la fidelaj gepatroj Ges-roj H. De Roover, al la onklino S-ino Frieda De Roover kaj la aliaj familianoj ni tutkore gratulas kaj deziras la plej bonan por la estonteco.

Ni eksciis pri la edziĝo de S-ro Chr. Declerck el Ostendo, delegito de UEA, kiu trovis amatan edzineton en Deurne-Antwerpen. Ni deziras al la juna paro longvan vivon, daŭran bonfarton kaj seninterrompan feliĉon.

### HONORIGO:

S-ro Hektor Vermuyten estis honorigata per la kavaliroeco en la ordeno de Leopoldo II. Al nia ankoraŭ ĉiam aktiva Hektor, al la ĉarma edzino kaj la tuta familio ni esprimas nian profundan ĝojon kaj niajn sincerajn gratulojn.

La 3an de julio S-ro Eug. Paesmans gvidis 30 gemembrojn tra malnova kvartalo de Antverpeno kaj daŭre mirigis la promenantojn pro sia profunda kono de la historiaj kaj folkloraj sciindaĵoj.

La 10an, malgraŭ la tropika varmeco, kunlaboris al la programo "Ĉirkaŭ la Fajro" diversaj fideluloj: S-ro Mia Goossens kun rimarkinde bona raporto pri sia helpo al gvidado tra Antverpeno de instruistino kaj infanoj el Wilsle kiuj sekvas Esperanto-kurson; S-ro Frank Jacobin kun detala raporto pri la urba promenado de antaŭ unu semajno; S-ino L. Bernaerts memorigis travivaĵojn dum la Un. Kongreso en Boulogne; angla S-ano S-ro Hall Smith, vizitante la grupon, raportis pri sia libertempo en Jugoslavujo; S-ro Ivo Durwael persone organizis enketon inter junuloj pri Esperanto kaj konigis la rezultojn grandparte favorajn kaj S-ro Fr. Schellekens preparolis la Ĉinan pentroarton, montrante pri tio belegajn lumbildojn. S-ro R. Van Eynde, kiu jam dum diversaj kunsidoj anstataŭis S-ron Jaumotte libertempan- te en la eksterlando, bonege prezidis.

La 17an sub la influo de la libertempo oni agrable kunestis: rakontante, babilante aŭ kartludante.

La 24an S-ro R. Van Eynde, fojon pli, zorge flegis la dokumentan film-vesperon. Unu filmo eĉ estis tre aktuala: tiu pri la mondekspozicio de Nov-Jorko.

La 31an denove oni agrable kunestis.

La 7an de aŭgusto dum la distra vespero diversaj gemembroj kunlaboris kaj sukcesis krei amuzan sferon: precipe S-ro C. Borremans per gvidado de komuna kunkantado kaj plue la prezentado de ŝarado multe helpis.

La 14an pro la antverpena kermeso ne okazis kunveno.

Reĝa Esperantista Brusela Grupo.  
Kunsidoj: ĉiutage en "Monico Nord"  
2, Brabanto strato BRUSELO-3.

La 1an de Junio, okazis la ĉiumonata journalo. Diversaj gemembroj kunlaboris al ĝia sukceso. La 8an, S-ino Jacobs sukcesis kapti ĉies plenan atenton pere de interesa, eĉ sprita parolado pri "Hunda Psikologio". La 15an, S-ro van der Stempel daŭrigis sian perfe-

tigan kurson. La 22an, Sino Staes faris tre interesan paroladon pri "Brajla Alfabeto kaj Esperanto". Tiu ofte mal-konata temo vekis ĉe la aŭskultantoj specialan atenton. La 29an "Ruĝa Monaĥejo" estis la temo elektita de Fino Opsomer, kiun ŝi al ni prelegis.

La 6an de Julio, okazis la parolata gazeto. Al ĝia sukceso kunlaboris diversaj gemembroj. La laŭreatoj estis en kategorio A. Sino Staes Elly kaj en kategorio B. Fino Opsomer Simonne. La 13an, grupo ne laboris al la preparo de la brusela antaŭkongreso. La 20an NE okazis kunveno kaj la 27an Sro Kanoniko GILLET prelegis interesan temon kies titolo estis "Belgaj Inĝenieroj en Ĉinujo antaŭ 60 Jaroj".

**Programo por estontaj kunvenoj :**

#### EN SEPTEMBRO :

la 7an la parolata ĵurnalo ; 14an programo fiksota ; 21an parolado fare de Sro Maertens, "Karavano al la Suno" kaj la 28an programo fiksota.

#### BRUGA GRUPO ESPERANTISTA.

Reĝa Societo :

Poŝtĉekkonto N° 4835.33

La 23an de junio okazis la lasta kunveno antaŭ la libertempa periodo, por kiu lastaj aranĝoj estis alprenataj.

Ne okazis kunveno la 30an de junio, 7 an kaj 21an de julio, sed la 14an de julio unuaj impresoj estis donataj pri vojaĝo al Lago de Garda kun elmonro de multaj fotografajoj.

Grupa promonado laŭlonge de la lumigitaj kajoj okazis la 28an de julio. La 4an kaj 18an de aŭgusto ne okazis kunveno, sed la 11an, F-ino. M. Willems, reveninte el la 49a U.K. en Hago, donis unuajn informojn pri tiu kongreso.

#### FAMILIA KRONIKO

GRATULOJ al Sro. Raoul BEHAEGHEL, membro kaj estinta komitanto de B.G.E., kiu edziĝis kun F-ino. Gabriëlle VANDERSTEEN. (Anderlecht 4/7/64).

**PROGRAMO**  
**POR ESTONTAJ KUNVENOJ :**  
Ĉiumarde, je la 20-a, en "Strijdershuis" Hallestraat, n° 14, Tel. N° 347.98 :  
29an : Parolado de F-ino. Y. Poupeye pri "Jan van Eyck".

#### OKTOBRO

6an : Impresoj pri la Lago de Garda kun kolordiapozitivaj.

13an : Parolata gazeto kaj debato.

20an : Detala raportado pri la 49a U.K.

Hago — F-ino. M. Willems.

27an : Legado kaj tradukado.



— Okazis en Scheveningen, marbordo, dum la Universala Kongreso, kiam mi disponis hazarde pri iom da libera tempo.

#### KORESPONDO :

Bulgara instruisto deziras korespondi kun belgaj fraŭlinoj aŭ sinjorinoj. Adreso : S-ro V. Smolnica, reg. Tolbukinski, Ivan, Nikolov, Bajcev. Bulgarujo.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54



## VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj  
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



### PRECIPAJ CENTROJ:

|            |  |
|------------|--|
| Antwerpen  | : Aalmoezenierstr. 2<br>Abdijstr. 57<br>Anselmostr. 17<br>Nationalestr. 87 |
| Arlon      | : Marché-aux-Légumes 16  |
| Brugge     | : Breidelstr. 8  |
| Brussel    | : Galerie d'Ixelles 9<br>Anspachlaan 194                                   |
| Eupen      | : Kirchstr. 14   |
| Gent       | : Brabantdam 25  |
| Herstal    | : Rue Large Vote 4   |
| Leuven     | : Bondgenotenlaan 29   |
| Luxembourg | : Place de la Gare 67  |
| Mechelen   | : Grootbrug 8  |
| Roeselare  | : Ooststr. 124   |
| Tournai    | : Rue Royale 75  |
| Turnhout   | : Herentalsstr. 6  |
| Verviers   | : Pont St. Laurent 2   |